

# Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 4 2015    Vendredon la 30an de oktobro    63a jaro

---

## Kalendaro

Ĉiuj kunvenoj komenciĝos je la **18a 30.**

**Mardo la 3a de novembro** (sem. 45) – *tirsdag*

Temo el la studkajero *Subtekste*.      *Diskusjon om artikkel el Monato.*

**Lundo la 16a de novembro** (sem. 47) – *mandag*

Matias Jentoft prezentos la E-kurson *Matias Jentoft: E-kurset ved Duolingo. Kial ĝi furoras?*      *Matias Jentoft: E-kurset ved Duolingo. Hvorfor er det så populært?*

? **23/28 novembro** (sem. 48)

Kromkunveno? Ni atendas gaston *Ekstramøte? Vi venter en gjest fra el Turkio. Li "pretas instrui Esperanton aŭ prelegi pri [siaj] esperantovivo kaj vojaĝoj tra Esperantujo".*      *Tyrkia. Han skriver at han kan fortelle om sitt esperantoliv og om sine reiser med esperanto.*

**Mardo la 1a de decembro** (sem. 49) – *tirsdag*

Pri lingvaj opozicioj. Otto Prytz klarigos pri fenomeno trovebla en multaj lingvoj. Kun tiuj klarigoj kiel fono li el lingvosciencia vidpunkto respondos al la demando, ĉu Esperanto estas seksisma lingvo.      *Om språklige opposisjoner. Otto Prytz forklarer et fenomen som fins i mange språk. Med disse forklaringene som bakgrunn besvarer han fra språkvitenskapelig synspunkt spørsmålet om esperanto er et seksistisk språk.*

**Lundo la 21a de decembro** (sem. 52) – *mandag*

Literatura kunveno. Ĉiuj prezentu iun libron. (Aŭ nur venu aŭskulti.)      *Litteraturmøte. Alle velger en bok og forteller om den (eller bare hører på de andre).*

**Mardo la 5a de januaro** (sem. 1) – *tirsdag*

Esperoj kaj perspektivoj por Esperanto en 2016.      *Hvilke håp og perspektiver ser vi for esperanto i 2016?*

# OKAZIS

## **Afrika agado (13.8)**

Okaze de vizito de Anita Dagmarsdotter el Svedio ni aranĝis kromkunvenon pri afrika agado, pri kiu ŝi havas longan sperton. Ŝi rakontis pri siaj kontaktoj kun – kaj subteno al – tanzanianoj ekde la 80-aj jaroj kaj pri sia partopreno en aranĝoj en okcidenta Afriko en la lastaj jaroj, kun bildoj i.a. pri la 5a Afrika Kongreso en Benino.

Kaj ŝi eldiris: Vizitante Afrikon unuafoje vi aŭ enamiĝas (pro naturo kaj homoj) kaj ĉiam volas reveni, aŭ male: vi neniam volas reveni (se vi ne eltenas densajn homamasojn, bruon, fremdajn odorojn).

## **La Universala Kongreso (1.9)**

Kjell Peder, Otto kaj Cato raportis pri la 100a Universala Kongreso en Lille. Ili konstatis ke tiom multis kaj tuttagis la teatraj kaj muzikaj programoj ke kongresano facile povus pleniĝi per ili sian semajnon, sen atenti la fakajn prelegojn kaj movadajn diskutojn. Kaj certe validis ankaŭ la malo, ĉar oni starigis novan programon, "Scienca kafejo", por povi prezenti la multajn proponitaj prelegojn kiuj ne trovis lokon en la Kongresa Universitato.

Cato kunhavis sian porteblan komputilon, kaj per siaj pli ol 1700 bildoj el la kongreso ŝajne povus illustri mension de preskaŭ iu ajn okazintaĵo en la kongreso.

## **La komunuma baloto (21.9)**

Ni prikomentis la rezultojn de la ĵusa komunuma baloto. (Pri la gubernia baloto ni malmulton aŭdis per la amas-komunikiloj.) Kaj finrezultoj mankas entute en Oslo kaj en sufiĉe multaj aliaj komunumoj, ĉar neniu alianco tuj ricevis absolutan plimulton de la mandatoj, sed ambaŭ estas dependaj de intertraktoj kun la Verduloj aŭ aliaj malgrandaj partioj por povi starigi regipovan grupon.

Ni interparolis ankaŭ pri tio, kiel helpi al certaj afrikanoj pri ties pezaj ekonomiaj problemoj, kaj ni diskutis pri la novaj ebloj savi la ekonomion de la E-kursejo/ gastigejo en Lesjöfors.

## **La ukraina konflikto (27.9)**

Kromkunveno kun Aleksandro Melnikov. Li prelegis pri la kaŭzoj kaj la evoluo de la milito en orienta Ukrainio kaj de la konflikto inter Ukrainio kaj Ruslando.

## **Ripeto, kun traduko (29.9)**

Ripeto de la dimanĉa prelego pri Ukrainio por kelkaj membroj de pri-ukraina grupo (iam temgrupo de *Norges fredslag*), kun buŝtradukado al la norvega (Otto Prytz).

## **Kiel formi novajn vortojn? (6.10)**

Interlingvistika temo, parte surbaze de artikolo de Federico Gobbo en *Esperanto* aprila. Li distingas kvar manierojn fari vortojn en Esper-

anto: laŭ la skribo, ekz. butero (angla/germana *Butter*); laŭ la el-parolo, ekz-e ŝerco (germana *Scherz*) aŭ kaŝi (france *cacher*); kalkeo (traduko de metaforo) ekz-e partopreni (germane *teilnehmen*); forĝi el jamaj elementoj, ekz-e samideano. Zamenhof formis ankaŭ hibridajn vortojn: *ŝtono* (angle *stone*, germane *Stein*), ĝardeno (angle *garden*, france *jardin*).

Al azianoj ni prefere diru "mal-sanulejo" ol "hospitalo". Sed ĉi-lasta ebligas pluformadon:

"hospitaleto", "enhospitaligi".

### **Pri rifuĝintoj (19.10)**

Kiel prirapidigi ensociigon de rifuĝintoj? Ili devas atendi en rifuĝopetantejoj dum monatoj, eĉ jaroj, sen sencohava laboro aŭ ekz-e lingvokurso. Tio estas recepto por psika sufero kaj konfliktokreado. Valorus kaj indus investi multe pli en aktivigaj iniciatoj kaj kulturaj aferoj, i.a. lingvokursoj. Ilustre ni aŭdis ankaŭ pri kelkaj malfeliĉaj individuaj sortoj esperantistaj.

---

**Ĉu vi havas proponon de temo** por prezento aŭ diskuto en estonta kunveno? Ĝi povas esti E-movada, lingva aŭ socia/monda.

---

## **Info-budoj en foiroj?**

Info-budoj en foiroj kaj konferencoj donas bonan sed maloftan okazon renkonti la publikon – precipe junulojn – kaj informi pri Esperanto. Ofte jun(et)aj homoj tute ne aŭdis pri ĝi, kaj ne imagas ke tia lingvo povas ekzisti kaj esti uzata.

Sed tiaj konferencoj kaj foiroj ne tre oftas. Foje ili okazas loke, for de la urbocentro, ekz-e en biblioteko. **Se vi scias / aŭdos** pri tia aranĝo, kie eblus starigi informbudon (senpage aŭ malmultekoste), bv. sciigi tion al ni.

**Viktig:** *Si fra om du vet om en messe eller festival e.l. hvor vi kan få satt opp en info-bod eller en liten utstilling.*

---

## **Ĉu vi rimarkis bonajn afiŝ-tabulojn?**

La plej multaj afiŝ-tabuloj, surstrate kaj en butikoj, estas tiel maltaŭge lokitaj ke homoj nur preterpasas tute ne rigardante ilin. Sed kelkaj funkcias – en butikoj kie elirantoj vidas ĝin rekte antaŭ si, aŭ ĉe bushaltejo. Tiajn bonajn ni notas kaj kolektas por posta uzado. Bv. helpi nin trovi pliajn!

*De fleste oppslagstavler, i butikker og i gatene, er slik plassert at ingen enser dem. Men det finnes noen som fungerer, f.eks. ved utgangen i butikker eller ved bussholdeplasser. Si fra hvis du vet om noen vi kan bruke.*

# Vizitkartoj

NEL mendis stokon da vizitkartoj. Ni baldaŭ havos ilin en Esperantonia.



La simbolo estas verdkolora. La dorsflanka teksto estas:

For å få vårt nyhetsbrev Esperanto-nytt tre ganger i året, skriv til:

info[a]esperanto.no

gratis nettkurs: [www.lernu.net](http://www.lernu.net)

[www.duolingo.com](http://www.duolingo.com)

ESPERANTO: LETTLÆRT OG LEVENDE

La nova *Esperanto-nytt* videblas interrete ĉe [esperanto.no/enytt](http://esperanto.no/enytt).

Pri ĝi legu en *Norvega Esperantisto* 4, p. 5 – 6 kaj n-ro 5, p. 3 kaj 4.

## El la vendobretaro

Antaŭ kelkaj jaroj nia klubo transprenis la librostokon de Eldonejo Esperanto. Ni havas centon da titoloj, ekz-e *Esperanto en perspektivo*, *Leksikaj ekskursoj*, *Faktoj kaj fantazioj* (Marjorie Boulton), *Ĉu li bremsis sufiĉe?* (Claude Piron), *Kalevala*, *Bagatelaro*, *Unumane*, *Fajrejo* (la tri lastaj estas rakontoj de Johan Hammond Rosbach).

Ankaŭ T-ĉemizojn kaj glumarkojn.

Cetere ni havas grandan kolekton da **kromekzempleroj de periodaĵoj**: *Heroldo*, *Sennaciulo*, *Literatura Foiro*, *Kontakto* k.a. Senpage preneblaj!

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schouss vei 18\*, 0572 Oslo. Tlf. 22 35 08 94

Tramo 17 al Sinsenterrassen aŭ buso 31 al Rosenhoff aŭ metroo 6 al Sinsen.

Vd. pli detale interrete ĉe [esperanto.no/oslo](http://esperanto.no/oslo) -> "vojklarigo".

\* inng. Schouterrassen. [www.esperanto.no/oslo](http://www.esperanto.no/oslo) Retpoŝto: oficejo[a]esperanto.no

Bankkonto 0532 36 19699 (sed kotizonu pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).